

Boletín

M A Y O
J U N I O

1 9 5 8

PELAYO, 7

VALENCIA

(ESPAÑA)

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

■ LA PACIENCIA DE LOS IMPACIENTES ■

Todós cuantos, desde largos años, han llegado a convencerse de la utilidad y eficacia del Esperanto para resolver el problema lingüístico, en que el mundo está anacrónicamente sumido, se impacientan, lógicamente, y se preguntan extrañados dónde está la perspicacia, la clarividencia y la sindéresis de aquellos que, por rango cultural y posición rectora, tienen la obligación moral y profesional de conocer la magnitud del problema idiomático y, por ende, la existencia de pronta y eficaz solución al mismo. Si todo el mundo reconoce que el caos existente es insostenible, solo caben dos consideraciones a la actual situación: o no existe por ahora solución alguna, o ésta, si la hay, debe ser poco viable, a juzgar por la persistencia del problema. Es lamentable tener que confesar que la mayor parte de los que tienen el deber de conocer los términos del problema: universitarios, diplomáticos, lingüistas y políticos desconocen en absoluto la existencia de un idioma-remedio, o tienen de él un concepto erróneo. Otros, en notoria minoría en relación con los primeros, conocen su existencia, pero tienen de él una impresión superficial y falsa, en cuanto a su constitución, lógos y fines, menospreciando por ello su justo valor. Si los primeros no tienen perdón, por la suficiente publicidad y difusión del Esperanto, menos lo merecen los segundos, por regatear bizantinamente al idioma internacional la posibilidad de su total vigencia.

Y resulta realmente desconsolador que, a estas alturas, no se acepte el remedio por si es o no es amargo, siendo así que es eficaz, con unánime aprobación de quienes lo han estudiado con la suficiente ecuanimidad y necesaria capacidad para enjuiciarlo. En esto, los esperantistas son más generosos y eclécticos, puesto que, más o menos apasionados por su hermoso idioma, al que consideran, con justicia, adecuadísimo para resolver la incomprensión mundial, no vacilarían en aceptar cualquier otro, que apareciese como más apto, con tal de suprimir este vergonzoso anacronismo. Y mientras quienes deben resolver el problema pierden el tiempo de la manera más crasa, el mundo se impacienta. Se impacientan los que sufren a diario por el embrollo idiomático; los que se ven separados por fronteras de comprensión, mucho más altas e infranqueables que las aduaneras; los que consideran a cada momento que no viven en el mundo, sino en una demarcación idiomática, que para muchos es ridículamente exigua. Y se impacientan, sobre todo, los esperantistas, que saben —fundadamente— con cuanta facilidad podría suprimirse el caos.

Está pues fuera de duda, que para soportar con paciencia el actual estado de cosas, ya se va necesitando tanta, cuanta tuvo que tener el bueno de Job...

Todo tipo de declaraciones oficiales a favor del Esperanto, no pasan generalmente de ahí, sin que verdaderamente se intente algo en serio. Hay una especie de tozudez colectiva, en no querer hacer una prueba real lingüística, porque si quedaba demostrada su eficacia ante los ojos de los recalcitantes, pueden imaginarse las consecuencias. Nosotros seguiremos nuestro camino, demostrando que el entenderse los seres humanos y criaturas de Dios, no es tan difícil como se cree; y conste que también existimos esperantistas, que hablamos otros idiomas e incluso trabajamos profesionalmente en ello. De ver que el problema quedaba resuelto a través del inglés, francés, alemán, etc., no tendríamos inconveniente en arrojar por la borda, todo nuestro bagaje esperantista. Eso no quiere decir que no se pueda tener interés por cuantos idiomas extranjeros sean de nuestro agrado; (es más, el Esperanto predispone a ello, luego no es enemigo de ningún idioma nacional) pero hay una cosa que sí puedo asegurar por experiencia propia; cuanto más se manipulan lenguas extrañas, más se aprecia el valor del Esperanto y se es más convencido esperantista.—Manuel Rodríguez-Madrid

ESPERANTO EN LA AMERIKA KONGRESO DE BLINDULOJ

En la temaro de la 3.^a Amerika Kongreso de Blinduloj, okazinta en Montevideo (3-8/marto/1958), estis enskribita la temo «Enkonduko de Esperanto kiel familia lingvo inter la Blinduloj», laŭ propono de Ekvadoro (kies delegito S-ro Byron Eguiguren Ordóñez ne povis ĉeesti la Kongreson) prezentita de Bolivio (delegito S-ro Alfredo Tarifa Sánchez). Tiun temon pridiskutis la Kongreskomisiono pri Kultura Disvastigo, kiu, laŭ la juĝoj alportitaj de Argentino (delegitoj S-roj Federata Anglés kaj David López) kaj de «Urugvaja Esperanto-Societo», reprezentata de Prof-o Manuel Fernández Menéndez, kaj konsiderante la grandegan gravecon de la disvastigo de Esperanto inter la blinduloj por ilia kultura estonteco, prezentis proponon, kiu estis unuanime aprobita de la Asembleo de la Kongreso, laŭ teksto de jena

RESOLUCIO

1. Organizi kursojn de Esperanto ĉe la blindulaj institucioj en ĉiuj amerikaj landoj, invitante neblindajn studentojn al tiuj kursoj, por stimuli plej fortajn sociajn rilatojn inter la blinduloj kaj vidantoj.
2. Faciligigi la fondiĝon de blindulaj grupoj esperantistaj en la blindulaj institucioj de ĉiu lando, kiuj subtenos daŭrajn kulturajn interŝanĝojn kun esperantistaj centroj de la tuta mondo.
3. Rekomendi, ke, kiam la kreskado de la blindulaj grupoj esperantistaj permesos, la Amerika Konsilantaro por Blinduloj estigu efektivan interligon kun la L. I. B. E. (Ligo Internacia de Blinduloj Esperantistaj), por atingi, inter aliaj bonaj, la uzon de la esperantista kupono (pagoservo), kiu faciligos la akiron de didaktika kulturmaterialo el aliaj landoj.
4. Interesigi ĉiujn Braille-gazetojn de Ameriko, por ke ili diskonigu la avantaĝojn de Esperanto; kaj same ankaŭ, laŭeble, ke ili enkalkulu en siajn eldon-planojn la presadon de tekstoj kaj broŝuroj en la nomita lingvo.
5. Rekomendi al ĉiuj registaroj en Ameriko la enkondukon de kompleta lernado de moderna fremda lingvo, krom Esp., en ĉiuj oficialaj institucioj por blinduloj.

En la Asambleo Plenaria del Congreso Panamericano de Ciegos, celebrado en Montevideo (Uruguay) del 3 al 8 de Marzo 1958, fué aprobada por unanimidad, acerca del tema «El Esperanto como idioma familiar entre los ciegos», la siguiente

RESOLUCION

- 1.º Organizar cursos de Esperanto en las instituciones de ciegos de todos los países de América, invitando a estos cursos a estudiantes videntes, para fomentar una más estrecha relación social entre ciegos y videntes.
- 2.º Facilitar la formación de grupos de ciegos esperantistas en las instituciones tifológicas de cada país, los que mantendrán intercambio cultural permanente con los centros esperantistas del mundo.
- 3.º Recomendar que, cuando el incremento de los grupos de ciegos esperantistas lo permita, el Consejo Panamericano pro Ciegos establezca conexión efectiva con la L. I. B. E. (Liga Internacional de Ciegos Esperantistas) para obtener, entre otros beneficios, la implantación del cupón esperantista, que facilitaría la adquisición de material didáctico cultural de otros países.
- 4.º Interesar a todas las publicaciones periódicas Braille de América, para que difundan las ventajas del Esperanto; y asimismo, en la medida de lo posible, para que procuren la inclusión en sus planes editoriales, de textos y folletos en dicho idioma.
- 5.º Recomendar a todos los gobiernos de América la implantación, en las instituciones oficiales de ciegos, del estudio completo de un idioma extranjero moderno, además del Esperanto.

Montevideo, 5 de Marzo de 1958.

Raúl Dávila, Presidente.

Joaquín J. Silveira Márquez, Secretario.

Federico Anglés, David López, Vocales.

LETERO DE IZRAELO de S-anino Marie Ginžová

Al siaj geamikoj el la Esperantista Klubo de Praha (Ĉeĥoslovakio). Jen specimeno de freŝa priskribo, kiun aperigis ĝia interesa Bulteno kaj plezure ni represas, ĉar efektive tiu letero povus esti modelo el tiuj, kiujn ni ŝatus --por adekvata aperigo-- regule ricevi de niaj karaj eksterlandaj legantoj.

Estas multaj aferoj pri kiuj indus rakonti. Mi provos diri al vi iom pri izraela fervojo. Oni devas veni ĝustatempe, ĉar kelkajn minutojn antaŭ foriro de la vagonaro, oni fermas ĉiujn enirejojn, por ke ne okazu malfeliĉo. Matene ekonas el laŭparoliloj voĉo de la staciestro: «Bonan matenon, gesinjoroj! Nun alproksimiĝas la unua vagonaro, veturonta al Tel-Aviv kaj Jeruzalemo. Mi petas vin, en via intereso kaj en intereso de via familio; Ne alproksimiĝu al ĝi antaŭ ol ĝi haltos». Tiun averton li ripetis kelkfoje; kaj li invitas ĝentile, kiam oni povas jam eniri en la vagonojn. Krome, antaŭ ol la vagonaro moviĝas, li deziras agrablan vojaĝon al ĉiuj pasaĝeroj. Oni ofte rimarkas, ke oficialaj instancoj turnas sin al la civitanoj ne kiel oficoj, sed iel persone. Estas agrable tiamaniere rilati kun homoj...

Ni, kompreneble, jam ĉesis bani nin (en Decembro) sed ni estis unuj el la plej persistaj. La garda turo estas nun forlasita ĉe la bordo; oni ne plu hisas tie flagon blankan, ruĝan aŭ nigran, por indiki ĉu estas la maro trankvila, iom onda aŭ danĝera. Malgraŭ ĉia singardo, en ĉiu sezono okazas malfeliĉoj. Vespere, precipe dum nokta trankvilo, ni aŭdas la ondo-bruon, kiu fariĝis nia lulila kanto. Kaj en nian fenestron daŭre palpebrumas la lumturo de Haifa.

Neniam mi povus kredi, kiel bela povas esti la ĉi-tiea firmamento. Ĝi ŝajnas esti nekutime alta; ĝi estas klara kaj brilas; ofte ĝi estas lazure blua, senmakula; iam surestas nuboj en fantaziaj formoj kaj koloroj, tute nekutimaj; iam ravas la ĉielo per delikataj pastelaj koloroj, laŭ ĉiuj nuancoj. Iam, ĉe la sunleviĝo, aperas antaŭ niaj fenestroj arbusto, kvazaŭ en flamoj; kaj mi komprenas la ekeston de tiu konata biblia rakonto.

Al tio aldonu la regionon, en kiu ĉi tie

ni vivas: De tri flankoj, en malproksimo, nin ĉirkaŭas seninterrompa ĝirlando da montoj, kiuj fermas nian larĝan horizonton. Antaŭ ni estas la maro, ni do havas mirindan rigardon je ĉiuj flankoj.

Ĝus hodiaŭ, post abunda pluvo, la suno sin apogis al la montaro, kuŝanta norde kaj nordokcidente de ni. La radioj montris detalojn ĝis nun ne konatajn, deklivojn kaj nemultajn valojn de la preskaŭ seninterrompa montoĉeno. Tial ke la montoj ne estas tre altaj, ili neniel timigas, sed vekas nur admiron. La suda valo de la montaro, kun monto Karmel ĉe la fino, najbaras la maron kaj fermas la golfon de Haifa, ĉe kies ekstremo kuŝas la urbo Haifa mem. De proksime oni vidas maron da belaj, plejparte ŝtonaj, domoj, inter kiuj pompas imponaj modernegaj betonaj konstruaĵoj. Granda parto de la urbo situas sur monto, super la golfo.

La stratoj estas konstruitaj inter rokoj, laŭ plej sagaca maniero; plaĉaj vilaĵoj kaj artisme kreitaj loĝdomoj estas ĉirkaŭitaj de ĝardenoj kun multaj palmoj kaj diversaj aliaj, ĝenerale ne konataj, arboj. La komerca kvartalo, kun belaj viglaj stratoj, meze de granda trafiko, troviĝas malsupre, ĉirkaŭ la haveno kaj iom super ĝi. Volonte mi promenus kun vi en ĉefstrato Herzl, kaj vi neniam ĝin forgesus. Mi invitas vin ĝui la rigardon de sur la monto Karmel al la urbo, kuŝanta sub vi, kaj al la haveno kun blua maro, sur kiu manovradas ŝipoj. De malproksime estas videbla la urbo, kiel brila diademo, ĉar ni troviĝas kiel en giganta kaj grandioza amfiteatro. Sur norda ekstremo, ni vidas iom neklare la urbon Akko kun ĝiaj altaj turoj. Vespera rigardo al Haifa, kiam ĝi dronas en elektra lumo, kun tre longaj plurkoloraj strioj, estas io vere nepriskribebla, kaj oni sentas sin kiel en iu el la fabeloj de Mil kaj Unu Noktoj...

◆◆◆ ESPERANTO EBLIGAS LA PLEZURON DE TUTE SPECIALA EMOCIO ◆◆◆

Okaze de efektiva vizito en eksterlando, sed ankoraŭ nur simple legante la priskribon de samideano, oni sentas agrablan kontentigon, pro tio ke oni plej funde komprenas la sencon kaj penetras en la animon de la tuta rakonto. Jen do supera kvalito de nia spirita tutmondeco!

◆ NOVA DEMONSTRADO DE LA TEOREMO DE PITAGORO ◆

Oni povas facile demonstri la faman Teoremon de Pitagoro en tute nova maniero, konsiderante kelkajn rilatojn okazantaj de enskribita cirklo, precipe apogante nin sur la rilato $a = b + c - 2r$. kie a , b , c , r , estas respektive la mezuroj de la hipotenuzo, katetoj de ortangula triangulo kaj la rajono de la enskribita cirklo.




FIG. 1

FIG. 2

Tiu ĉi rilato videblas en la fig. 1 kaj estas facile demonstrebla, pere de la teoremo pri tangentoj, kondukita de punkto al cirklo. Ni antaŭmetu observon, post kiu la demonstrado aperos evidenta el la figuro mem, kiu ĉi-supre troviĝas.

En ortangula triangulo ABC oni kompletigu rektangulon ABDC kaj konduku la paralelojn al la katetoj tra E (en centro).

Surbaze de la citita teoremo, oni facile vidas, ke la pseŭdorombaj CHEK kaj BIEK estas ekvivalentaj respektive je la rektanguloj CHEG kaj BIEF. Tial rezultas, ke la donita triangulo ABC estas ekvivalenta je CABFEG. Sed la triangulo ABC estas duono de la rektangulo ABDC kaj tial ankaŭ CABFEG same; el kio venas, ke ĉi tiu lasta havas saman surfacon de la rektangulo GEFD ĉar la sumo de ambaŭ estas la tuta rektangulo ABDC. Tiun ĉi interesan rilaton ni povas esprimi per:

$$r(b-r) + r(c-r) = r^2 = (b-r)(c-r) \quad (1)$$

kie la literoj havas la signifon supre donitan. Desegninte nun la fig. 2 oni tuj vidas, pro la ĵus demonstrita rilato, (1) ke la eroj de la kvadratoj de la katetoj estas ĉiuj entenataj en la kvadrato de la hipotenuzo, kio pravas per si mem la teoremon.

Alie, laŭ la fig. 2, ni havas:

$$\begin{aligned} b^2 + c^2 &= (b-r)^2 + r^2 + 2r(b-r) \\ &+ (c-r)^2 + r^2 + 2r(c-r) = \\ &= (b-r)^2 + (c-r)^2 + 2. \end{aligned}$$

$$[r(b-r) + r(c-r) + r^2] = (\text{pro la (1)}) = (b-r)^2 + (c-r)^2 + 2.(b-r)(c-r) = a^2$$

K. E. D.

(Kio estis demonstrata)

AUGUSTO BALOSSINO Milán (Italio)

ORIGINALO INTERLINGVA PARALELO TRADUKO

Armado hasta los dientes, el hombre penetra asimismo en las montañas y en los bosques, destrozando cuanto pasa al alcance de su plomo mortífero. Lo mismo cae entonces la tímida cierva que el valiente jabalí; lo mismo persigue sañudo y cruel al oso forzudo que al débil gazapo, y lo mismo le deleita la agonía del primero que la del segundo. Su único afán es matar, sin otro objeto que la gloria de la matanza.

De un artículo del escritor y periodista José María de Pereda (1833-1906).

Armita gisdente, (*) la homo eniĝas ankaŭ en la montojn kaj en la arbarojn, detruante ĉion, kio pasas je trafdistanco de lia mortiga plumbo. Same falas tiam la timema cervino aŭ la kuraĝa apro; same li persekutas fie fortan kruele la fortikan urson aŭ la malfortan kuniklidon; kaj same plezurigas lin la agonio de la unua, kiel tiu de la dua. Lia sola aspiro estas mortigi, sen alia celo krom la gloro de la mortigado.

(*) Plej abunde.

El artikolo de la verkisto kaj ĵurnalisto Jozefo-Maria de Pereda (1833-1906).

La praktikismo kaj supera idealismo de Esperanto kombinas atuton!

LAŬTPAROLILO DE LA ESPERANTISTARO

FRAZFREŜEKO KAJ KOMPRENO

En intervjuo raportita en «*Esperanto*» (Feb. 1957) S-ro Ivo Rotkvič, akademiano, respondis kun vigla vervo. Admirindaj estas la freŝa frazkreemo, la sencotrafaj esprimoj ekmulditaj de tiu majstro, kiam... ili estas okule observataj dum senurĝa legado. Tamen, ĉu vere oni tuj komprenus lian dirvolon, aŭdante prelegon de li en kiu sporadus tiaj neordinaraj parolturnaĵoj, forsonantaj en la Sanktan Nenion? Estas danĝero, ke tiu formfreŝeco dolĉe lulas la spiriton sed maltrafas la komprenon, simile al la bela muziko, per kiu oni sentas kareson ĉe la oreloj, sed poste oni ne povas zumkanti eĉ ses sinsekvajn notojn.

Jen sekvas kelkaj ekzemploj:

elkisas sorĉajn tonojn
(kp. elfluti monon al iu).

balgaj krispoj de Esperanto
(ne tre klara).

dispordus novajn perspektivojn
(pordi al io).

elmeme (per si mem; en si mem).

alventita (venti ion al iu).

disperleras torento.

tra kiu disaraneajis siajn delikatajn
radikojn niaj emocioj.

stebŝira koncizo

(I. staccato; kraketado?)

Ni estas konsciaj prie (pri tio).

kalkanside (en unu senco de *kaŭre*).

ĝi havas el-enajn leĝojn

(kp. «versigis en... ŝuojn kaj elen».

F. de And. vol. I p. 17).

Samgazete B. Ragnarsson: ŝaumideanoj (homoj kun haosaj, aŭ trivialaj «ideoj»?); frustrato: (ĉu en psikologia senco de deprima sento de vivovaneco, de vanigeo?).

La malrutina stilo de Rotkvič pensigas min: ĉu prelegantoj kaj radioparolantoj


sufiĉe atentus la neceson de *tuja* kompreno ĉe la aŭdantoj? Koncerne la tujan komprenoblecon, mi mem pli ol unufoje ek-konsciis pri la granda diferenco inter la skribita kaj la legata (aŭ libere oratorata) lingvaĵo. Mi verkis artikolon pri la recenzarto. Ĝi ja sufiĉe bone efikis kiel legata artikolo; sed, uzante ĝin por prelego, mi devis konstati, ke en ĝia presita formo mankis tiu absoluta esprimsimpleco, kiu garantius facilan absorbon dum la relative rapida fluo de la vortoj el mia buŝo en la komprenaparaton de miaj aŭdantoj. Mi tial reverkis ĝin, uzante kurtajn frazojn kaj forigante la cetero bonajn sed tro neordinarajn esprimojn, kiuj postulus pli ol momenta cerbumado ĉe la aŭskultantoj.

Mi emfaze konsilas, ke publikaj parolantoj uzu kurtajn frazojn kaj nur klaran senornaman stilon... t. e. ofte aŭdatan, «ortodoksan» lingvaĵon. Ili evitu tenton ekspluati la esprimeblojn de nia mirinda lingvo, rezervante tiajn ekzercojn nur por presotaj paĝoj. En la nuna etapo de nia afero, tiu konsilo estas nepre sekvinda. En la estonteco, kiam Esperanto estos jam vaste parolata lingvo, la freŝaj, originalaj, sukoplenaj frazoj, plejparte metaforaj, figurecaj, estos komunaj posedaĵoj, facile rekoneblaj je ekaŭdo por parollingve matura «popolo». Dume, atendante tiun tempon, ni ne uzu formojn, cetero bonajn en literatura senco, sed malfacilajn por homoj de malforta memoro uzantaj nur la orelojn.

La sukceso de publikaj paroladoj, tiom tre grava por ni, dependas de la plezuro kaj profito ricevataj de la aŭdantoj. Nur kristalklara, simplaelementa prepara verkado povas tion certigi. Mi aparte direktas atenton de radiuloj Esperantaj al tio. Pli simpla stilo en tiu agkampo tre povas favorigi nun, pli ol iam, nian aferon ĉe la administracioj.

F. H. BANHAM
(Melburno) - (Aŭstralio)

La Directiva de la Federación Española de Esperanto hace constar a todos sus asociados que el hecho de haber sido utilizada la «Adresaro», para distribuir impresos, ajenos a nuestra entidad, no significa relación ni connivencia alguna. Muchos abonados al teléfono, y aquellos que, por su profesión o por ser miembros de sociedades, figuran en anuarios, también reciben por correo las más diversas propagandas, sin que ello signifique relación alguna entre los editores y dichos organismos. Nos cumple hacer constar pues lo que el buen sentido de nuestros afiliados seguramente ya les habrá hecho comprender.



Panoramio de Peñíscola (elp. Penjiskola) la surmara citadelo, kiu dum kelke da jaroj (1415-1422) estis sidejo de la papo Benedikto, la XIII-a. Oni ekskursos tie, okaze de la Kongreso.

CASTELLON --EDENO DE FLORANTAJ ORAÑGARBAROJ-- VOKAS VIN!

Nur du monatoj restas ĝis la pompa efektiviĝo de nia Kongreso en Castellón. La tempo pasas tiel rapide, ke ankoraŭ lulataj de la vibrado de nia sukcesa rendevuo en Madrido, dum la pasinta somero, ni eksentas jam denove la emocian tremon de nia proksima tutlanda renkontiĝo, kie, tute certe, ĉiuj kongresanoj trovos, kun la plenumo de sia devo --kiel konsciaj esperantistoj-- la ĝuon de agrabla restado kaj la plezuron de multaj distroj kaj amuzoj, meze de nia grandfamilia rondo. Precipe, eksterlandanoj, kaj ankaŭ hispanoj el la centraj aŭ nordaj regionoj, vidos, ke, en belsomera medio, oni elektis ĉizitan kadron por travivi neforgeseblajn momentojn, laŭ disvolviĝo de la kongresa programo.

Solenaj akceptoj, fare de aŭtoritatuloj, en luksaj salonoj, alternos kun fruktodonaj labor-kunsideoj kaj mirindaj ekskursoj al sorĉe ravaj lokoj, kiuj postulos multajn metrojn da filmo el la fotoaparatoj, por fikse bildigi la ĉarmajn flankojn de malavara Naturo, kiel ideala fono por tre agrablaj scenoj kun gesamideanoj kaj amikoj, en vigla rolo de aktivaj kongresanoj. Jes, al ĉiuj atendas jam, post longa vintro, la varma saluto de ridanta suno, kiu milde vin envolvos per la kareso de lazura dorlotanta maro, en ĉiutaga regalado.

Simpla rigardo al la programo estas ja loga promeso de sinsekvo da tiuj emocioj, spirite kaj materie sanaj, kiuj estas motivo plej pravigebla por la ĉiujareco de niaj kongresoj. Certe, katalunoj kaj valencianoj amase ĉeestos, pro facila kaj malmultekosta veturo; sed, espereble, ankaŭ ceteraj hispanoj multenombre venos, renkonte al frataj brakoj en fervora aklamo ĉe la fantazia bordo de la blua Mediteraneo... Vere, eksterlandaj gesamideanoj havos okazon, ekster la plezuroj de sun- kaj marbanado, ekkoni kuriozajn aspektojn kaj historiajn restaĵojn de nia varia kaj romantika lando: Malnovaj mezepokaj ruinoj, kiel arogaj postsignoj de sia iama grandeco, staras aŭ kuŝas inter agavoj kaj nopaloj.

Riĉkoloraj kostumoj kaj tipaj popolaj dancoj, la granita maso de imponaj kasteloj aŭ fortikajoj, saturitaj de famo kaj gloro, liveros adekvatan etoson, en agrabla akompano de gastamaj kaj babilemaj samideanoj, ĉiam pretaj agrabligi supermezure la restadon de karaj samlingvanoj, venintaj el ekstero por sperti mem ĉu la entuziasmo kaj brilo de la hispanaj kongresoj estas realo kaj ne troigo en la publikigitaj kronikoj.

Resume: Se tiaj kronikoj emfaze raportas pri verva pasio kaj senhalta sinsekvo da plezuraj momentoj, venu do vi ankaŭ, kiel protagonisto de nia granda festo, kiu nepre bezonas la simpatian de via ĉeesto por esti ĝoja, por esti gaja, por esti granda...

Jen devizo plenumenda: La tuta hispana samideanaro, en tre kompakta fronto, en lavango da entuziasmo, senhezite, al Castellón, la urbo de nia 19-a Kongreso!

XIX CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO ● Castellón 24-27 Julio 1958

Dirección del Comité Organizador: Calle Alloza, 189 - CASTELLÓN

Sigue a ritmo creciente la organización de nuestro magno Certamen. Las autoridades y corporaciones de la ciudad de la Plana están muy interesadas en los preparativos que han de mostrar el entusiasmo y la pujanza del esperantismo español. Seguramente, durante el Congreso, será rotulada una calle de la ciudad con el nombre del Dr. Zamenhof. Corresponde a todos nosotros hacer realidad las esperanzas de los organizadores. Siguen en venta los bonitos sellos, en una segunda edición. A mediados de Mayo estará a la venta la tarjeta del Congreso, que, como siempre, será un alarde de arte y buen gusto. Su precio de 1.50 pesetas cubre tan solo los gastos de impresión y papel; adquieráse en cantidad suficiente para que la reciban todos los amigos extranjeros, como una muestra valiosa de todo lo nuestro.

TESORERIA.—Han sido varios los socios que han pedido aclaraciones sobre la inclusión de la factura, por los carteles del Congreso en Madrid, en el balance general. Hemos de aclarar que, llegado el 31 de Diciembre sin recibir el importe ni noticias al respecto desde Madrid, se tuvo que incluir en el balance la cantidad que se había pagado ya a la empresa litográfica de Valencia. Hasta hoy, a pesar de las gestiones realizadas acerca de esto, nada positivo se ha logrado, estando todo aún en la misma situación y sin conocimiento del desenlace económico que tuvo el Congreso. Esperamos quede todo aclarado en Castellón.

NE TIEL, SED TIEL ĈI! de akademiano F. Faulhaber

De la nederlanda studfolio «La Progresanto» ni represas ĉi tiun interesan artikolon, kun rekomendo pri atenta legado.—La Redakcio

BONA STILO ESTAS VARIA

Ne nur la vestoj de nia korpo, sed ankaŭ tiuj de niaj pensoj, suferas por uzado. Vortoj kaj esprimoj tre ofte uzataj en iu verko iom post iom perdas sian freŝecon, sian esprimforton kaj faras la tekston monotona kaj teda. Precipe en temoj kiaj historio, vojaĝado, kongresoj k.s., kiuj postulas sinsekvan notadon de faktoj kaj okazintaĵoj inter si pli-malpli similaj, kaŝigas la danĝero fali en tiun pekon kontraŭ bona stilo.

En vojaĝraporto, kiun mi iam legis, la aŭtoro senĉese ripetis la samajn — nur kelkajn — adjektivojn kaj adverbojn por esprimi siajn miron kaj admiron pri tio, kion li vidis kaj spertis dum sia vojaĝo. Kiel ekzemplon mi donas rikolton el nur 15 paĝoj sinsekvaj: mirinda vetero — mirinda marbordo — belega vetero — beleco de la insularo — mirinde! — grandegaj parkoj — belega sanktejo — templo, kiu rivalas laŭ beleco — belega libro — mirinde bela — plej mirindaj sanktejoj — mirindaĵoj de tiu urbo — mirinda sanktejo — belajoj — pagodo unu el la plej belaj — s-ro S. klarigis mirinde — la plej belaj misteraĵoj — ni admiris la belan oktobran pejzaĝon — estas mirige kiom da virinoj laboras — ni admiris la akvofalon kaj aliajn belajojn — estis belega dimanĉo — lertega sekretario — bonega ideo de s-ro O. — ni rigardis la beleĝan teatron — en la bela centra parko — ĉarmaj knabinoj — belegaj kimonoj — la stacioj estis belege kaj bonege ekipitaj — ĉarmaj samideaninoj — monto kies pinto estas blankega — s-ro S. estas la plej grava eksportisto — ni vizitis la plej gravajn te-pakejojn — grava urba

biblioteko — ĉarmaj pejzaĝoj — fama kaj belega monteto — la plej fama ŝoguno — ĉarmaj knabinoj — mirindaj kimonoj — ili dancis belege — donaco de la ĉarmega fraŭlino M. — estis tre belega silka pakajotuko.

Ne necesas havi tre delikatan guston por rimarki la troan uzadon de *mir'*, *bel'* kaj *ĉarm'*, de la sufikso *eg*, kaj de la superlativo *la plej... a*.

Daŭrigata sur multaj pluj paĝoj, tia stilo baldaŭ ĉesas impresi la leganton kaj fine efikas al li laciĝe kaj tede. Jam longe antaŭ ol la leganto atingis la finon de la libro, tiuj vortoj similas elpremitajn citronojn, ne povantajn plu ellasi eĉ nur unu guton da signifo.

En verko de tia amplekso (pli ol 200 paĝoj) oni devas — precipe komence — uzi tiajn vortojn tre ŝpareme, por ke oni ne simulu la vetkuranton, kiu tuj post la starto streĉis ĉiujn siajn fortojn, por kio ne restis al li sufiĉe por glorie atingi la finon. Tial la aŭtoro de la ĉi supre aludita libro, kiu volis igi nin partopreni lian admiron kaj entuziasmon, ne plene sukcesis. Lia vortotrezoro estis tro malgranda k pro tio li ne kapablis variigi sian stilon. Por eviti tian monotonecon en sia verkaĵo, oni zorgu disponi pri sufiĉe da sinonimoj kaj pri iom da lerto por — se necese — esprimi sin alimaniere. Donante tiun konsilon, ni fakte suriras la kampon de la beletristiko, de la vortartisto, kio ne estas la celo de ĉi tiu artikolaro. Tamen la atentigo ankaŭ pri ĉi tiu peko kontraŭ bona stilo povas esti utila por akiri bonan esprimmanieron.

KATALUNA KARAVANO AL LA KONGRESO

La Organiza Komitato de «Instituto de Esperanto», en Barcelono, klopodas la aranĝon de karavano por ebligi plej facilan vojaĝon al la kongresurbo kun oportuna certeco pri la reveno. Tiel oni atingos atentindan rabaton de RENFE kaj taŭgan impreson ĉe la publiko pro nia efektiva multenombro. Ĉiuj interesuloj bonvolu sin turni, kiel eble plej baldaŭ al S-ro F. Abella Coll, str. Llagostera, 19 - Barcelono, indikante nomon kaj adreson.

Katalunoj, amase al Castellón, al la 19-a Hispana Kongreso de Esperanto!

ĈU VI KONAS LA ESPERANTISTAN KULTURDOMON EN GRESILLON?

Antaŭ ses jaroj, la Francaj Esperantistoj aĉetis, en la bela regiono de la «Loire-aj Kasteloj», la bienon Gresillon. Tie, meze de bela parko, kun lageto, banejo kaj boskoj por trankvile promeni, la Esperantistoj el la tuta mondo sentas sin hejme. Tiu eta peco de Tero vere estas Esperantolando.

Oni tre facile povas iri al Gresillon, ĉu per vagonaro, ĉu per aŭtobuso, ĉu, kompreneble, ankaŭ per persona veturilo.

La kulturdomo ofertas nun al siaj gastoj tre modernan komforton; kaj la vivo tie estas tute libera, kondiĉe, tamen, ke oni povu organizi la kolektivajn laboron kaj distron; ĉar oni ankaŭ sin amuzas en Gresillon; oni eĉ dancas....

Por 1958, la kulturdomo proponas la jenan ĝeneralan programon:

Dum la Paska libertempo.

De la 30^a de Marto ĝis la 13^a de Aprilo: Esperanto kurso-Bindarto-Diversaj okupoj.

(Inter kiuj: korbofarado, ludoj, dancoj...)

De la 15^a de Junio, ĝis la 14^a de Julio: Ripozo-Esperanto kurso por komencantoj Bindarto-Diversaj okupoj.

De la 15^a ĝis la 27^a de Julio: Internaciaj Feriaj.

De la 27^a de Julio ĝis la 10^a de Aŭgusto: Lernado de la franca lingvo pere de Esperanto.

De la 10^a ĝis la 31^a de Aŭgusto: Niaj Esperantistaj Kulturaj Semajnoj.

De la 1^a ĝis la 20^a de Septembro: Ripozo kaj diversaj aranĝoj.

Ni ege konsilas aligi sufiĉe frue.

Por ricevi pliajn informojn, skribu al

Esperantista Kulturdomo,

Kastelo de Gresillon - BAUGÉ

(Maine et Loire) - Francujo - tel: 34. Baugé

Ni estos dankemaj se vi aldonas respondkuponon

..... KIEL?

Antaŭ kelkaj jaroj, okaze de informopeto adresita al hispana samideano, loganta en norda parto de nia lando, mi skribis al li en nacia lingvo. Post malmultaj tagoj, mi ricevis respondon en kiu, interalie, oni povis legi:

«...kaj multe mi miras, ke vi, malnova esperantisto, ne uzas la internacian lingvon, kiam vi skribas al samideano, kvankam li estas samlandano via. Ni havas la moralan devon skribi ĉiam en ESPERANTO...»

Pluraj monatoj jam forpasis de kiam mi sendis cirkuleron al multaj hispanaj geesperantistoj, petante al ili la aliĝon al Junulara Esperanta Organizo, kiun tiam mi reprezentis en Hispanujo. Mi konsideris oportune redakti ĝin en la internacia lingvo. Unu semajnon poste, mi ricevis afablan leteron de maljuna kaj malnova esperantisto, loganta en granda urbo. La ĉefa kialo de la antaŭdirita letero estis sciigi min pri la opinio de la sendinto.

Li skribis:

«...Aplaudu su labor y le felicitó por la misma, pero una sugerencia me permitiré hacerle: ¿Por qué no escribe en castellano cuando se dirige a esperantistas de nuestro país? Siempre he considerado que el uso del idioma auxiliar debe reservarse para comunicarse con personas de habla distinta a la nuestra...»

Post ricevo de la dua letero, mi komencis pripensi la aferon. Kiu pravas? Certe la opinio de niaj karaj kaj kleraj legantoj povos lumigi la dubojn pri oportuneco por ĝusta apliko de la granda kreaĵo de Zamenhof. Plezure mi legos precizajn kaj mallongajn respondojn ĉi tie mem.

Vi havas la parolon!

RAMON MOLERA - Moyá (Barcelona)

..... Internaciaj Feriaj Kursoj: «Esperanto kaj Geonismo» en Kastelo MUENCHENWILER, apud Murten-Morat (Svislando)

Jus aperis sespaga prospekto pri tiuj ĉiujaraj kursoj, kiuj okazos ĉi-foje de la 10^a ĝis la 17^a de Aŭgusto 1958, do tuj post la Universala Kongreso en Mainz. La plaĉa ilustrita dokumento prezentas la programon de la Supera Kurso, kie alternas studo, kunlaboro, instruo, liberaj horoj, ripozo en la kastelaj parko aŭ arbaro, prelegoj, debatoj, muziko, ludoj, filmoj k. t. p. Esperanto estas instruata laŭ la rapida «Ora Metodo» de D-ro-W. Perrenoud, direktoro de la kursoj. Komencantoj havos agrablan kurson elementan, kun uzo de la frekvent-listo de Profesoro P. Bovet. La Geonismo kreas aktivan harmonion inter homoj, respektante kaj ŝatante ĉies devenon aŭ apartenon. La prospekto estas havebla senpage ĉe Svisa Esperanto-Instituto, Breitenrainstrasse, 12, Bern (Svislando).

Tempolimo por enskriboj: 12 Julio 1958; poste sen garantio. Tial do, ne multe hezitu!

Montano Jovo

BULGARA POPOLA KANTO

«Ĉu vi ŝin donas, montano Jovo,
la belan Jana al islamano?»

—Aŭdu, bandestro: kapon mi donas,
Jana-n ne donas al islamano!

Oni dehakis al li la brakojn,
kaj lin demandas kaj pridemandas:

«Ĉu vi ŝin donas, montano Jovo,
la belan Jana al islamano?»

—Aŭdu, bandestro: kapon mi donas,
Jana-n ne donas al islamano!

Oni dehakis al li la krurojn,
kaj lin demandas kaj pridemandas:

«Ĉu vi ŝin donas, montano Jovo,
la belan Jana al islamano?»

—Aŭdu, bandestro: kapon mi donas,
Jana-n ne donas al islamano!

Oni elpikis liajn okulojn,
lin ne demandas nek pridemandas,
sed oni prenis la belan Jana,
ŝin sur rapidan ĉevalon metis,
por ŝin forporti al la kamparo—
al la kampara vilaĝ' tata.

Jana al Jovo milde parolas:
—Restu kun Dio, ho frato Jovo!

—Iru kun sano, vi-bela Jana!
Mankas l' okuloj por vin rigardi,
mankas la brakoj por vin brakumi,
mankas la kruroj — vin akompani!

El la bulgara lingvo tradukis

ASEN GRIGOROV

El «Nuntempa Bulgario» (numero 11 - Novembro 1957)

LA MEMORO DE KURACISTO

Por la praktikado de sia nobla profesio,
kuracisto devas scii la nomojn de 707
arterioj, 71 ostoj, 433 muskoloj, 230 nervoj,
403 vejnoj, 109 tumoroj, 295 venenoj kaj
pli ol 10.000 drogoj.

La homa korpo konsistas minimume
el 527 muskoloj. El ili, 522 troviĝas je
paroj, nur la ceteraj estas simplaj. Ilia
distribuo, tra la tuta korpo, estas jena: en
la kapo, 83; en la kolo, 49; en la torako, 78;
en la abdomeno, 33; en la dorso, 78; en la
supraj ekstremaĵoj, 98; en la malsupraj 108.

*Aĉetaĵo nenecesa, eĉ kiam ĝi
kostas nur unu centimon, estas
multekosta.*

S É N E C A

SFINKSA ANGULETO

PSIKO-MATEMATIKA PROBLEMO

Johano kaj Petro estas fratoj de Maria;
ili ambaŭ estas samaĝaj, kvankam ne
ĝemeloj. Ankaŭ —plej mirinde— inter si,
ili ne estas eĉ parencoj.

Kiel oni povas klarigi tion?

Ĝusta solvo gajnos unu poenton ĝis 15. Junio.

**SOLVO PRI LA STRANGA ŜTUPARO
EN LA PASINTA NUMERO**

Ĉar tiuj geedzoj loĝas en keletoĝo.

RIDETO ESTAS HOMA PRIVILEGIO

Patro klarigas al sia filo la diferencon
inter fusilo kaj maŝinpafilo. Li ilustras
la klarigon per jena komentario:

—Estas, kvazaŭ mi parolus unue, kaj
poste respondus via patrino.

Edzino de estro sin turnas al grumo
de la oficejoj:

—Ĉu vi scias, kien iris mia edzo?

—Ne, sinjorino; tamen, pri tio povas
scii la tajpistino.

—Voku ŝin!

—Neeble; ŝi foriris kun via edzo...

Tajloro al amiko:

—La poŝto ĉi tie funkcias tre malbone.
Antaŭhieraŭ mi sendis naŭdek fakturojn
al miaj klientoj; kaj mi ricevis respondon
de nur du el ili.

En rondeto de diletantoj, oni babilas
pri fantomoj. Inter kredanto kaj flegma
skeptikulo fluas jena dialogo:

—Ĉu okaze, iam vi vidis fantomon?

—Tute ne, kompreneble, la plej veraj
fantomoj estas nevideblaj!

PRAKTIKAJ KONSILOJ

Ĉiuspecajn juvelojn el oro aŭ argento
oni povas tre bone purigi per varma akvo,
al kiu oni aldonis iom da esenco de amoniako.
Post la lavado, frotu ilin per eta
broso, antaŭ ol fine repoluri ilin per ŝamo.

Por purigi vitrojn aŭ kristalojn, frotu
ilin unue per malseka kaj poste per seka
peco de gazetpapero.

*Nenio okazas, kio ne estas
eltenebla. Marco Aurelio*

CURSO PRATICO DE ESPERANTO de D-ro FERENC SZILÁGYI com exercicios de leitura e versao e 210 ilustraçoes. Adaptado ao uso dos povos de lingua portuguesa por Ismael Gomes Braga. 100 paços, 13 x 18 cm. Eld.: Cooperativa Cultural dos Esperantistas, Aven. 13 de Maio, 47 Rio de Janeiro (Brazilo). — Prezo nemontrita.

Refoje aperis eldono --la tria en portugala lingvo-- de la jam bone konata lernolibro de F. Szilágyi. Oni konstatas, ke la nova broŝuro, kvankam sufiĉe loge belaspekta, estas represita sur iom malpli bona papero. Pro la amuza enhavo --desegnoj kaj varia legaĵo-- la verketo disvastigis tutmonde kaj disfamis Adamson tra la samideanaj medioj. La trihara heroo estas la centra rolulo de la lecionoj. Ke la libreto ĝojige distras la lernantojn, ke ĝi ne sole siatempe plaĉis, sed iĝas daŭre kontentiga, tion pravas elokvente la eldisvendado de la diverslingvaj adaptaj. Ĉar nia movado multe prosperas en Brazilo, sendube la nuna eldono baldaŭ elĉerpigos, kiel la antaŭaj. Al Kultura Kooperativo de Esperantistoj, gvidata de sindonaj energiaj samideanoj, sinceran gratulon kaj novan pluan sukceson!

Ismael Gomes Braga, la inteligenta, vigla kaj sperta pioniro, ne nur adaptis la tekston al la portugala lingvo, sed ankaŭ valorigis la verkon per diŝe kromaj klarigaj notoj. Bedaŭrinde estas konstatite, ke la tre kompetenta tradukinto ne ĝustigis kelkajn esprimojn, malatente transigitaj de unu lingvo en alian.

Vidu la esperantan ŝlosilon, ĉe la fino, kaj komparu ekzemple la duan proponicion el la unua leciono: «Li sidas sur la seĝo», kun la portugala ekvivalento: «Ele está assentado em uma cadeira». Kial *uma*, portugala nedifina vorteto, anstataŭ *a*, difinita artikolo, laŭ la senco de la originala teksto? La jena traduko: «Ele está sentado na cadeira», estus la preferinda, almenaŭ tiel oni komune parolas kaj skribas en Portugalujo. Nature, la brazila dialekto kaj la portugala lingvo ofte malsamiĝas.

Notu la ĉi-subajn frazojn:

«Kiu trinkas? Ĉu mi parolas? Ĉu vi ridas? Mi miras. La sinjorino prenis la kaktan kaj ĵetis ĝin. Li ne mortigis sin, sed per la revolvero li pafis la portreton

de la fraŭlino. Tiu ĉi kafo vere ne estas trinkebla. La infanoj amis unu la alian. Lia kapo neniam doloris dum lia tuta vivo. Ĉu vi havas ĉe vi vian monujon?»

Kaj rilatigu la brazilan dirmanieron kun la analogaj portugalaĵaj parolturnoj, por trovi la diferencon:

Braz.: «*Quem está bebendo? Estou eu falando? Está você rindo? Eu me admiro. A senhora tomou o cacto e lançou-o. Nao se matou, mas atirou com o revolver no retrato da senhorita. Este café, na verdade, nao é possivel de beber-se. Os filhos amavam um ao outro. Sua cabeça nunca doeu durante toda a vida. Tem você a sua bolsa com você?*»

Port.: «*Quem está a beber? Estou a falar? Você está a rir (ri-se)? Admiro-me. A senhora pegou no cacto e arremessou-o. Nao se matou, mas disparou o revolver contra o retrato da rapariga. Na verdade, nao é possivel beber-se este café. Os filhos amavam-se um ao outro. Durante toda a vida nunca lhe doeu a cabeça. Traz (tem) o seu porta-moeda consigo?*»

Ĉu la malsameco estas grava? Tute ne! Simpla nuanco de formo. Nur mi volas reliefigi la neceson sekvi la laŭdindajn kaj imitendajn klopodojn de la brazilaj samideanoj. Modeloj de streĉita volo, de persista sindonemo por atingi konkretan rezulton, de konstanta, neŝangebla fido je la venko de la songita celo, ili meritas, ke ni forte aplaŭdu kaj senkondiĉe aprobu siajn entreprenojn kaj iniciatojn. Agante sammaniere, kun egale firma deziro kaj konvinko, la portugaloj ankaŭ sukcesos elesperantigi aŭ originale verki lernolibrojn kaj aliajn, kiuj pli precize reflektos sian karakterizan stilon kaj brile rejetos la genion de sia bela praprolata aŭ nuntempa lingvo.

Oni ne devas forgesi, ke fortikaj baroj kontraŭstaras; kaj ke la aŭtoritatoj estas nekompreneble malfavoraj. Sen leĝigitaj kluboj, sen enlanda asocio, sen permesitaj kursoj, la movado nepre stagnas aŭ tre malforte disvolviĝas. Stoiĉe, la portugaloj sentas strebadon al pli fruktdona, senkaŝa laboro, sopiras al perdita libero, aspiras al venontaj pli feliĉaj tagoj por siaj rondetoj.

Ne senkuragiĝu!

«Ĉe guto malgranda, konstante frapante, Traboras la monton granitan».

ADOLFO NUNES - Lisboa

En la portugallingvaj tekstoj, mankas kelkaj specifaj nedisponeblaj supersignoj. — Noto de la Redakcio.

NOVAJ TURISMAJ PROSPEKTOJ KAJ BROŜUROJ

HAMBURG.—Bela 12-paĝa broŝuro riĉe ilustrita en itala, germana kaj Esperanta lingvoj. Havebla ĉe Fremdenverkehrs und Kongress-Zentrale Hamburg e. V. Hamburg 1 (Germanio).

BERN LOETSCHBERG SIMPLON.— Ilustrita faldfolio pri la elektra BLS fervojo en angla, itala, hispana kaj Esperanta lingvoj, eldonita de la Vojaĝservo BLS. Genfergasse, 11, Bern (Svislando).

BONN.—Germanlingva faldprospekto, kun aldona Esperantlingva folio, pri la okcidentgermana ĉefurbo Bonn. Senpage havebla ĉe U. E. A.-Delegito Ernst Kind Nordstrasse, 97, Bonn (Germanio).

ĈEĤOSLOVAKIO.—Bela turisma faldfolio esperantlingva, havebla ĉe Ĉeĥoslovaka Turisma Oficejo, Na Prikope, 18, Praha, 3

VILAFRANKA DEL PENEDES.—Interesa faldfolio en hispana kaj Esperanta lingvoj, eldonita, sub la aŭspico de la urbestro de tiu kataluna urbo, de Vilafranka Esperanto-Grupo, Sociedad «La Principal», Villafranca del Penedés (Barcelona).

SALTO TRA JARCENTO. SEI WEISE REISE
Du belegaj broŝuretoj en Esperanto, eldonitaj de la Germana Federacia Fervojo. Rekte haveblaj ĉe Bundesbahn-Werbeamt. Frankfurt/am Main (Germanio).

Germana Esperanto-Junularo kaj la urbo
Homburg-Saar
invitas vin kore al la

14-a Internacia Junular-Kunveno de TEJO
Oficiala Antaŭkongreso de la 43-a Universala
Kongreso de Esperanto, okazonta de la 26-a
de Julio ĝis la 2-a de Aŭgusto 1958 en
Homburg-Saar (Germanujo).

Atentu Barcelonaj kaj Badalonaj amikoj!

Tiu amiko, kiu atendas leteron de mi estas petata sendi al mi sian tutan nomon kaj adreson, ĉar dum vojaĝo en eksterlando, mi perdis mian adresaron. Tuj, kiam mi denove ekhavas la perditan adreson, mi skribos al atentantoj.

Mi estas: S-ro Ingvar Ostelidh
KARLSTAD (Svedio) ☺ Dankon!

ĈU VI JAM LEGIS NIAJN ANONCOJN
PRI «ABABA»?

Vi povas esti la vendisto, kiun ni ankoraŭ bezonas! Skribu tuj senprokraste, laŭ la januara anonco, al ABABA.

PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a febrero-marzo de 1958)

Suma anterior.....	1.640 Ptas.
L. Sarribes - Tarrasa.....	50 »
D. Rodríguez - Madrid.....	250 »
A. Criach - Sabadell.....	50 »
P. Criach - Oslo.....	50 »
T. Apráiz - Bilbao.....	50 »
C. Gutiérrez - Bilbao.....	50 »
R. Jovani - Barcelona.....	10 »
A. Sánchez - Madrid.....	15 »
A. García - Bilbao.....	20 »
A. Bez - Milán.....	10 »
J. Ibáñez - Valencia.....	100 »
J. Perarnau - Tarrasa.....	20 »
Malnova samideano.....	200 »
J. A. Cortés - Daroca.....	10 »
R. de Luna - Barcelona.....	20 »
M. Noguera - Alcira.....	15 »
J. Oliveras - Barcelona.....	10 »
J. Guillomía - Barcelona.....	30 »
C. Berghanel - Barcelona.....	20 »
C. E. Puigcastellar - Sta. Coloma G.....	10 »
J. Peragordo - Madrid.....	50 »
E. Pérez - Valencia.....	25 »
V. Fernández - Barcelona.....	10 »
F. Iruegas - Vigo.....	10 »
S. Arizmendi - Eibar.....	44 »
N. Elézcano - Bilbao.....	15 »
R. Albero - Burjasot.....	10 »
V. Santamaría - Valencia.....	40 »
R. Maraury - Málaga.....	55 »
Kataluna familio - Barcelona.....	200 »
L. de Otaola - Bilbao.....	25 »
A. Ballestín - Zaragoza.....	10 »
S. Mayoral - Madrid.....	15 »
A. Marco - Zaragoza.....	10 »
D. Aguado - Osorno.....	5 »
J. Bremón - Barcelona.....	25 »
P. Naranjo - Jerez de la Frontera.....	5 »
N. Garriga - Tarrasa.....	25 »
J. Ezquerria - Madrid.....	20 »
M. Buscatí - Barcelona.....	10 »

Total..... 3.239 »

El esperantismo español responde a base de bien... ¡Muchas gracias, amigos!

TESORERIA

En el sorteo del 25 de Enero, por el núm. 24.551 fué agraciado con el premio de un ejemplar de «Kon-Tiki» el señor Antonio Alonso Núñez, de Pontevedra, por su «número de consolación» 51, del Fondo Pro-Administración.

En el del 25 de Febrero, por el número 39.716, D. Santiago Miquel Planas, por su número 14; y en el del 25 de Marzo, por el número 18.814, D. Juan Régulo Pérez, por su número 14.

S-ro Kalle Paaskyla, en KARESUWANTO (Finlando) deziras koresp. kun hispanaj gesamideanoj, por lerni la hispanan lingvon

*** AVIZO POR KORESPONDEMULOJ ***

Lastatempe, ni ricevis amason da korespondpetoj el Brazilo, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio, kies publikigo ne eblas en la reduktita spaco de ĉi tiu pago. Tial, ĉiu, kiu deziras ricevi oportunan kaj interesan adreson el unu el tiuj landoj, bonvolu turni sin rekte al la oficejo de nia Federacio: Pelayo, 7 — Valencia.

FILATELA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Ŝajne, multaj leteroj perdiĝis adresitaj al la poŝkesto de ĉi tiu Sekcio, en Barcelono. Sekve, malgraŭ tio, ke ni respondis ĉiujn ricevitajn, ni ne povas same garanti pri tiuj aliaj, eventuale senditaj, kiujn tamen ni ne ricevis.

La estro de la loka sidejo de la nacia oficiala organizo «Educación y Descanso» afable disponigis konvenan ejon por la Esperanto-Grupo LA VERDA KOLOMBEJO, en El Entrego. Tre interese por nia afero estas amasa gratulo. Adreso: Sr. Jefe de la Obra Sindical «Educación y Descanso» EL ENTREGO (Asturias) Hispanio.

JAPANA POŝTMARKA KOMPANIO

Je ĝia nomo, S-ro T. Ŝikanai. 1 Tokiŭadai, 4 ĉome, Itabaŝi-Ku — TOKIO (Japanio) deziras interŝanĝi neuzitajn poŝtmarkojn de via kaj sia lando. Oni volas aranĝi bilancon, ĉiufoje, transkalkulante la valoron, kiun montras ĉiu poŝtmarko, laŭ la proporcio: 100 jenoj = 9.25 pesetoj. Serioza intertrakto!

La Nagoja Televida Turo eldonis prospekton en Esperanto, memore al la 44-a Japana Esp. Kongreso. Ekzempleron oni povas ricevi senpage, se oni petas ĝin rekte al la entrepreno mem, kies adreso estas jena: Nagoja T. V. Turo Nakaku, Kaguraĉo — NAGOJA (Japanio)

Se ha publicado ya la séptima edición de «El Esperanto al alcance de todos»

de D. Fernando Soler Valls

Y está en prensa, próxima a salir, la cuarta edición de «Elementos de Esperanto»

del mismo autor.

«**Esperanto al alcance de todos**», vulgarización de gramática esperanto-española — Precio 25 pesetas.

«**Elementos de Esperanto**»

Curso para escuelas elementales — Precio 5 pesetas.

Encargos a Libro-Servo de la Federación Española de Esperanto, Pelayo, 7, o a los hijos del autor Avenida de José Antonio, 58 - VALENCIA

VOCABULARIO ESPAÑOL - ESPERANTO

del Doctor E. Tudela Flores

22.000 palabras

Precio: 65 pesetas

LIBROSERVO DE

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Du junaj fraŭlinoj deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn: F-ino Ŝoko Fuzimoto, bankoficistino, kaj F-ino Michiko Tamaki. ambaŭ loĝantaj en 3, Ŝimmei-ĉo AKASHI (Hjogo-ken) Japanio

S-ro Kjosuke Jukimura, 27-jara redaktoro de gazeto pri kokbredado, laŭ sama supra adreso, dez. korespondi pri tiu temo kaj serioze interŝanĝi fakgazetojn.

S-ro Shoichi Sakurai, 27-jara komencanto: Ote-ĉo AKASHI (Japanio) dez. korespondi pri aŭtomobilo-elekto.

Kelkaj 13-15-jaraĝaj liceanoj, redaktantoj de Liceo-jurnalo ŝatus koresp. tutmonde.

Skribu al Kinugaŝa-Chugakko,

Shimbun-bu Minami-Ozi-ĉo AKASHI

(Hjogo-ken) Japanio.

Deziras koresp. kun hispanaj geesperantistoj, kaj interŝanĝi poŝtkartojn, juna brazila esperantisto: S-ro Carlos Evandro Reixeira - Delegacia Seccional do Imposto de Renda. ITAJUBA (Minas Gerais) Brazilo

44-jara librotenisto ĉe mezgrada fabriko dez. korespondi kun hispana esperantisto samprofesia. Skribu al

S-ro H. C. Luijke, Parklaan, 108

KATWIJK AAN ZEE (Nederlando)

S-ro Taso Ivanov: Stefan Karuĝa, 17 KAZANLIK (Bulgario), deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun historiaj, geografiaj kaj sciencaj bildoj.

S-ro Pierre Bailly — CHAOURCE - Aube (Francio) kaj S-ro Mauricio Santoro Via Marsala, 22 - VERONA (Italio) deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

27-jara profesoro deziras korespondi kun hispanaj esperantistoj: S-ro Kristof Imre Kabók L. 46-III GYOR (Hungario)